



# **Vortarludoj**

**Petro Desmet'**



# ***Vortarludoj***

## ***Eldono de Flandra Esperanto-Ligo***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

# ***Vortarludoj***

# ***1. Enkonduke***

Estas treege multe da vortoj (radikoj) en nia PIV, sed ... ni (aŭ almenaŭ iu) iam povas bezoni ilin! Tamen ĝi ne estas kompleta, kaj neniam estos kompleta. Ekzistas pli ol 50 000 skaraboj, kaj ĉiu el ili bezonas nomon. Sed ekzistas ankaŭ en naciaj lingvoj neniuj ĝeneraluzaj vortaroj kiu listigas ĉiujn skarabonomojn! Kaj certe ne iu libro kiu enhavas ĉiujn, ĉar verŝajne hodiaŭ aŭ hieraŭ jam sciencistoj malkovris skarabon kiu ne jam havis nomon, kaj baptis ĝin!

## ***Vortara laboro***

Surbaze de PIV mi preparis Esperanto-nederlandan vortaron. Sed en PIV estas multaj terminoj kiujn vi eĉ ne trovos en nia dika *van Dale*, nia nederlanda norma klariga vortaro. Tial mi trovis, ke ni bezonas kompletan tradukon de ĉiuj PIV-aj kapvortoj, ĉar se ne ĝi ofte lasos vin frostiĝintlange.

Mi klarigos: Vi deziras ekscii la nederlandan vorton por **puvaterapio**, ĉar la vorto aperas en PIV, kaj vi supozas, ke ĝi estas *puvatherapie*. Vi pravas, sed vi ne trovos ĝin en *van Dale*. Mi trovis ĝin en Medicina Vortaro. Tio estis la kazo por multaj medicinaj terminoj! Kiam vi legas en PIV la difinon de **prikli**: "planti en alian lokon junan planton ĵus produktitan" vi tuj komprenas pri kio temas, sed ĉu vi ankaŭ konas la ĝustan nederlandan vorton? Respondo: *verspenen*, *pikeren* (precipe ĉi-lastas estas la faka vorto). Nu, tiun nederlandan vorton mi devis elserĉi ie, ĉu?

Vi legis la frazon: Mi rimarkis ŝian ruĝan pometon, kaj iom miris. Vi konsultas PIV-on kaj jes, vere, la dua signifo de **pometo** – ĉiu el la du elstaraj partoj de la vango sub la okulo – klarigas la situacion. Sed se vi devas traduki la frazeton en la nederlandan, vi bezonas taŭgan vorton por la pometo. Nu, taŭga nederlanda vorto estas *koon* aŭ pli bone *koontje*. Do: *Ik bemerkte haar rood koontje*. (Nepre dufoje tajpu la literon "o"). Povus esti, ke vi ne tuj trovis la ĝustan nederlandan vorton. Tiaj maloftaj vortoj multe aperas en nia vortaro, ĉar mi ĉiam strebis al la absolute ĝusta vorto!

Por **sekcia limpado** ekzemple aperas la ĝusta vorto, kiun preskaŭ nur krucvortenigmuloj aktive konas: nome *tra*. Cetere, ĉu vi scias la ĝustan nederlandan vorton por "la tordita metala drateto kiu fiksas la korkon de ĉampanbotelo al la ĉampanbotela kolo"? Mi jes, ĉar mi trovis ĝin.

Pri tia serĉado precipe temas la artikoloj en tiu ĉi libreto. Ĉu ĝi havas sencon por nenederlandlingvano? Jes, ĉar la ideo estas instigi vin trovi la ĝustan vorton en via propra lingvo, kaj vi konstatos, ke ofte vi bezonos iom da tempo, foje eĉ monatojn!

## ***2. Helpu min retrovi dormon!***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

### ***3. Kio estas la bazo de mia pripensado?***

#### ***Kio naskis la demandon?***

Povus esti foje utile klare diri kial mi notis tiujn ĉi pripensojn. Naskis la demandon la simpla rimarko de iu, kiu serĉis en mia vortaro, kaj ne trovis taŭgan tradukon por la nederlanda "*snijboon*" [tranĉfazeolo]. Pli ĝuste: ŝi opiniis, ke ŝi ne trovis taŭgan (laŭ ŝi, sed ankaŭ laŭ mi mem!) tradukon. En mia vortaro, ĉar la vorto "*snijboon*" enestas, oni trovos: *gastronomia fazeolo*. Tiu traduko povas esti ĝusta, sed dependas de la kuiristo kiu preparis ĝin! (la gastronomi-econ nome). Cetere, ĉiu speco de (manĝebla) fazeolo verŝajne povas esti preparita gastronomie! Pli ĝusta, sed nekontentiga, estus *ordinara fazeoluso*. Pli foren nia PIV ne iras! La respondo estas ankaŭ nekontentiga, ĉar *ordinara fazeoluso* (ni povas uzi pli popularan nomon: *ordinara fazeolo*) estas nomo de multaj kultivoformoj de iu



specio de fazeoluso.

## ***Familieca bezono***

Sed, uzanto de Esperanto, nepre se familia lingvo, devus trovi en mia vortaro taŭgan specifan vorton (aŭ vortkombinaĵon) por ĉiu aparte konata (ankaŭ de nespecialistoj) speco de fazeolo (atentu la uzon de speco kaj specio). Kaj kiel ĉiu normala lingvo, Esperanto kapablas esprimi ĉion. Mi trovas pli grave havi nomon por la diversaj fazeoloj ol por la diversaj pomoj. Por la pomoj, PIV konas, krom la Adama, kiel "verajn" pomojn: kalvilo, renedo, sukerpomo, *Belle de Boskoop* ... kaj plie, sed mi ne scias ĉu mi rajtas nomi ilin "verajn" pomojn: akaĵupomo, maluso (scienca nomo de pomo), dornpomo. Akaĵupomo kaj dornpomo NE estas pomoj, sed nur pomoformaj fruktoj de alispecaj arboj. Same pri sukerpomo.

Plie estas interese foje montri, ke la tradukvortaroj (al naciaj lingvoj) ne estas multe pli fortaj ol nia PIV! Laŭ mi, prefere ne doni respondon ol malĝustan! Kaj mi pensas, ke mi povas pruvi, ke la vortaroj tre ofte donas nepre

malĝustan respondon. Nu, ĉiu vortaristo, verŝajne eĉ ĉiu lingvisto, scias, ke plej bona maniero enkaĉiĝi estas riski sin sur tereno de kuirejo! Ni do kuraĝe daŭrigu nian esplorvojaĝon.

## *La verdaj fazeoloj*

Eble oni pensus, ke la Bildvortaro helpas, kaj donos pli da vortoj. Nu, ne estas tiel! Bildotabulo 59a, pri legomoj kaj legomplantoj, donas nur la fazeol(a plant)o, kaj aldone kiel specioj (ili ne estas specioj!): ĝardena fazeolo, multkolora fazeolo kaj fazeoleto (por la negrimpanta speco). Kio pri mia (adorata) PIV? Estas du kapvortoj: fazeolo kaj fazeoluso. La unua estas oficiala vorto, sed havas tre vastajn signifojn. Mi trovas, ke oni povas uzi la vorton "fazeolo" kiel popolnomon por *fazeoluso*. Ĉe fazeolo plie estas la vorto fazeoleto, kiel nana variaĵo de la ordinara fazeoluso (kies verdetaĵ semoj estas delikataĵo). Helpis min Varingjeno! En lia vortaro la fazeoleto estas "*flageolet*". La franca vortaro instruas min, ke la nederlanda vorto estas ... *flageolet*. Mi svage konas la vorton, sed mi fakte ne konas la respondan

legomon! Mia dika norma nederlanda klariga vortaro (*van Dale*) ankaŭ nur tre supraĵe klarigas: *speco de palverda fabo*. Klare, temas pri tipe franca, mi supozas, legomo! Mi pensas, ke mi iam kunportis por prepari, preparis ... (aŭ, honeste, preparigis) ... kaj ... ne tro ŝatis la delikataĵon. Nu ja, PIV estas franca produkto! Plie aperas la tri vaste kultivataj specioj: Lima fazeoluso, ordinara fazeoluso kaj ruĝa fazeoluso. PIV instruas, ke la ordinara fazeoluso nun estas kultivata en la tuta mondo. Ankaŭ, apud la ilustraĵo, aperas grimpa kaj negrimpa, nana. Mi supozas, ke la sugesto estas, ke negrimpa kaj nana estu sinonimaj.

## ***Kaj niaj verdaj familioj?***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***4. Kion kaŝas vorto ...***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***5. Ĉu vi konas la germanan rigidan Makson?***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## **6. Ĉu lumbriko blekas kiel leono?**

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***7. Etimologio de Etimo***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***8. Sidante en pudingo, mi alvokas miajn savantojn!***

La unua "Aldono al la U.V." enkondukis la radikon puding' en nian lingvon, kaj difinis ĝin en niaj kvin bazaj, difinaj lingvoj (franca, angla, germana, rusa, pola) per vortoj, kiuj tre similas puding'-on. Sed ĉu vere la kvin nacilingvaj vortoj difinas saman aferon? Estas certe, ke ili ne difinas saman aferon en la nuna lingvo! Ĉu antaŭ cent jaroj jes? Jen problemo, kiun oni ĝis nun ne sufiĉe konsideris. Ĉu vortaristo, facilanime, surpaperigu sian tradukon, surbaze de tre proksima simileco?

### ***Babela embaraso?***

Taŭga esprimo, mi pensas, apud la kutimaj "sidi en peĉo, kaĉo, merdo", por esprimi embarason, konfuziĝon. Mi estis embarasita, kiam mi konstatis, ke ne ĉiu pensas pri sama afero kiam li aŭdas la vorton pudingo. Se mi



aŭdas la vorton, mi pensas pri iu flava, vanilita, duonsolida, do ŝanceliĝema, dolĉa manĝaĵo, nevarma, varmeta aŭ malvarma deserto, ŝutita sur teleron, aŭ ankoraŭ ripozanta en ujeto vitra, porcelana, kartona, plasta aŭ en granda potoj, atendanta esti elkulerita de frandemul(in)o. Brito tamen, pensas pri tute alia afero ... Kaj tamen, la vorto pudingo estas unu el la plej internaciaj, ĉar mi trovis ĝin en multege da lingvoj, iom aliformita foje, sed ĉiam rekonebla, eĉ en la japana kaj ĉina kaj slovakaj kaj rusa kaj nederlandaj, franca, itala, hispana. Tiel mi do malkovris, ke la bona Dio, tamen en iu kolera momento, kiam li, en Babelo, decidis **"Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia"** (Gen 11.7) ne nur zorgis, ke la homoj parolu diversajn lingvojn, sed ankaŭ – kaj tio pli malofte estas rimarkata – ke ili uzu samajn vortojn por paroli pri malsamaj aferoj, kaj tiel plej efike konfuzu unu la alian!

## ***Falsaj amikecoj malgraŭaj***

Nun estus interese foje esplori ĉu la kuracilo de tiu dia damno, Esperanto, sukcesis

vere liveri rimedon por eliri el tiu mizero, por restarigi la interkompreniĝon ... ĉar ankaŭ en Esperanto ekzistas la vorto pudingo. En la praktiko mi konstatis ... ke ne, ĉar ĉiu verdstelulo uzas la vorton laŭ (kaj kun) la signifo kiun ĝi havas en sia nacia lingvo ... sed ... li ne nepre pravas farante tiel! Ekzistas ja normlibro(j), kiu(j)n ĉiu verdstelulo estas supozata obei. Minimume oni obeu ja la Fundamenton, pri la PIV oni ja povas diskuti! Estas do interese esplori la tutan situacion ... kvankam mi ne flegas la iluzion ke mi ŝanĝos la kutimojn kaj rekondukos la gregon sur la ĝustan rektan vojon!

## ***Etimologia pudingo***

Sed ni eble unue reiru al la vorto sankciita de la dek-kvina regulo de nia dek-ses-linia dekalogo, al la universala tutmonda vorto pud(d)ing. Laŭ la esploroj, aŭ inspirita sonĝo, de iu dokta filologo – li estu honorata – la etimo de la naciaj vortoj estus la angla *pudding*, kiu mem etimologie rilatas al malnovĝermana *puđ*, kiu signifis premi ion, kunpremi ion. Jes, ja, la originala maniero por prepari iun ajn

pudingon estis, ke oni plenigis iun tolan sakon (tukon aranĝita kiel sako, per kunligado de la kvar anguloj) per kaĉo el lakto, faruno kaj/aŭ diversaj aliaj aferoj kaj ke oni metis la fermitan sakon (fermitan per ŝnuro aŭ firma ligado) en bolantan akvon. Cetere ankoraŭ nuntempe iuj pudingoj estas prefere tiel preparitaj (vidu la biblion de Aŭgusto Escoffier). En tia maniero oni ankaŭ plenigis (purigitajn, mi esperas) bestajn intestojn (post forpreno el la besto, kompreneble) per io (ekzemple miksaĵo de viando, spicoj kaj sango) kaj preparis ilin en la sama maniero. Jen la klarigo ke la angla vorto *pudding* indikas ankaŭ iujn specojn de kolbasoj, kaj ke la sangokolbaso en Francio ricevis la nomon *boudin*. Cetere tio estas la etimo de la Esperanta nomo budeno!

## ***Britaj kaj britecaj pudingoj***

Ni unue esploru la naciajn pudingojn, kaj ĉar la angloj ja estis sufiĉe grandanimaj por transdoni sian vorton al la tuta homaro ni unue esploru la anglajn, la boanglajn (kiuj precipe troviĝas en Usono) kaj la eksfianglajn (kiuj precipe manĝiĝas en Aŭstralio) pudingojn. La

aŭtoritata deca Oksforda vortaro konas precipe du signifojn: 1. Mola aŭ iom rigida miksaĵo de bestaj aŭ legomaj ingrediencoj, precipe se miksitaj aŭ enfermitaj en faruno aŭ alia farunecaĵo, kuirita per boligado, vaporumado aŭ bakado 2. Intestoj de porko ktp, stufitaj kun avenfaruno, sango ktp. Alia aŭtoritata verko, la Norma Vortaro de Funk kaj Wagnalls (ofte nomata Collier), havas iom alian opinion. Ankaŭ ĝi du signifojn citas: 1. Dolĉigita kaj gustigita deserto de mola manĝaĵo, kutime faruneca 2. Intesto plenigita de spicita viando, sango ktp kaj kutime boligita aŭ stufita. La boangla, usona, vortaro prestiĝa, *Webster*, donas malsamajn difinojn en la luksa eldono kaj en la popoleca. Por riĉaj doktuloj *pudding* estas dolĉa deserto, dika kaj mola, tipe konsistanta el faruno kaj lakto kaj foje fruktoj; por plebano temas pri deserto de mola, sponga, aŭ dikkremeca konsisto. Estas do fakte sufiĉe da malsamopinieco inter tiuj diversaj difinoj. Rapida vizito al la angla Vikipedio instruis al mi, kaj mi tendencas kredi ĝin, kvankam mi neniam manĝis sangokolbason kiel deserton, ke por anglo *pudding* estas sinonimo de *dessert*.

## Ĝermanaj pudingoj

Por nederlandlingvanoj la nederlanda lingvobiblio dekretas, ke *pudding* estu 1. Pasto de faruno aŭ pecigita pano, lakto, ovoj, rengraso ktp boligita aŭ bakita en stana muldilo, kaj petas, ke oni komparu kun *plumpudding* 2. Miksaĵo de faruneca substanco (rizo, maizamelo, grio aŭ similaĵo) kaj lakto aŭ kremo kun gustigaĵoj, aŭ ankaŭ fruktsuko pretigita kun aglutinilo kaj, post malvarmiĝo, servita kiel deserto. Ĝi aldonas, ke en 1668 la signifo estis: pasto de faruno, rengraso ktp metita en tuko kaj boligita.

Ni restu, provizore, ĉe la ĝermanidoj. La granda, dika, dudek-kvar-voluma *Brockhaus* mirigis min! El ĉiuj konsultitaj verkoj ĝi estas la plej moderna, ĉar ĝi ŝajne konas nur la pudingon el plej moderna tempo. Unue ĝi deklaras, ke la vorto devenas de la malnovfranca *boudin*, kiu (prave) signifas kolbaso, kaj tiam daŭrigas: normale pere de pudingpulvoro – prete miksitaj produktoj (plej ofte el amelo kaj gustigaj elementoj) – farita dolĉaĵo, kiun oni miksas malvarma aŭ miksas

kaj poste boligas. Iom mirigas min, ke *Brockhaus* ne diras kun kio oni ĝin miksas! Supozeble la dietpudingo miksiĝas kun akvo, la normalpudingo kun lakto?

## ***Pudingo en Parizo kaj romanistejo***

Ĉe la francoj la vorto estas konata, sed tamen iom konsiderata fremdvorto. La bofrancoj kontraŭe (ili loĝas en Valonio) tre bone konas ĝin, kun la signifo kiun ĝi havas en la nederlanda. Laŭ *Larousse pudding* aŭ *pouding* estas deserto sukerita surbaze de faruno, sukero kaj butero en samgrandaj kvantoj, kaj ĝi estas garnita de fruktoj. La angla pudingo, aŭ *plum pudding*, estas karakterizita per uzado de bova graso. La *Petit Robert*, kiu ĉe doktuloj ĝuas plej bonan reputacion, distingas inter *pudding* kaj *pouding*. *Pudding* estas torto surbaze de faruno, ovoj, bovograso kaj sekvinberoj ofte parfumita per alkoholaĵo = *plum pudding*. *Pouding* estas maldelikata torto farita de bakistoj surbaze de malfreŝiĝinta pano. Mi aldonu, ke mi konstatis, ke ne ĉiuj francoj eĉ konas la vorton *pudding*, sed jes ja flan. Sed ... mirige, nia estimata Escoffier ne uzas en sia

libro, ankaŭ ne en la franca, la kategorion flan, sed abunde la kategorion *pudding* (en iuj receptonomoj li uzas la vorton flan).

La hispana sendiskuta aŭtoritato *Real*, oficiala klariga vortaro de la hispana lingvo, konas *pudin*, aŭ *puđín* en du signifoj: 1. Dolĉaĵo kiu prepariĝas per biskvitoj aŭ pano metitaj en lakto kaj kun sukero kaj sekaj fruktoj 2. Simila plado, ne dolĉa. Kaj utile eble estas aldoni la difinon de flan: Deserto kiu prepariĝas per ovoflavaĵoj, lakto kaj sukero kaj kuirigas en bolbano, en iu muldilo, ĝenerale kovrita de karameligita sukero.

Italoj ankaŭ manĝas *budino*, precipe kiel deserton aŭ manĝaĵon, konsistantan el firma aŭ duonfirma miksaĵo de variaj ingrediencoj, preparitan en forno aŭ bolkuirita en taŭga muldilo, sed konas ankaŭ la vorton, almenaŭ en iuj regionoj, kiel nomon de budeno. Do, ŝajne estas sufiĉe vastsignifa por italoj.

## ***Verda pudingo***

Kaj kio nun pri nia internacia pudingo? La

Fundamento de Esperanto, en sia Universala Vortaro, ne konas pudington. Sed jam en la unua oficiala aldono de la Akademio ĝi aperas. Tio tamen ne multe helpas nin, ĉar la aldonoj estas nur simplaj vortoj, sen la kvin kutimaj tradukoj nacilingvaj de la Fundamento. Sed, feliĉe, pudingo aperas en la vortaro de Kabe, kun la difino: angla dolĉa manĝaĵo, preparita el faruno kaj sekvinberoj. Eble la recepto estas iom tro simpligita, sed almenaŭ estas klare pri kio temas. Por Verax pudingo povis esti nur sinonimo de pudingŝtono: Rokaĵo konsistanta el ŝtonetoj aglomeritaj en cemento (malfacile digestebla!). Tia petro, malgraŭ facilanimaj vortaristoj kiuj baptas ĝin pudingo, devus nomiĝi konglomeraĵo (aŭ eble rudito, psefito sed ankaŭ tiuj vortoj ne estas PIV-aj). Waringhien, en sia franca vortaro, citas pudingŝtono.

Nia PIV, kiu ĉe mi vere ne ŝimiĝas en la libroŝranko, diras, ke pudingo estas deserta plado, miksaĵo el faruno, ovoj, graso, sukero, boligita en pelvo, bakita aŭ vaporkuirita. Trafas min, ke ankaŭ en tiu ĉi difino mankas iom da likvo, laŭ mi. Tamen do, nepre estas klare, ke la ĉefingredienco ne estas lakto! Iom strange estas



ankaŭ la pudingujo, la pelvo, kiu en sia propra difino tute ne eksplicite mencias sian apartenon al la kuireja ilaro! Por mi pudingo troviĝas inter flaŭno kaj torto spongeca, rilate firmecon de konsisto, do precipe dependas de la kvanto de lakto. Pudingo pli libere moviĝas ol sponga torto, eĉ ol babao, iomete kiel ventro de gaja dikulo kiam li ridas.

## *Falsamikaro de pudingoj*

Konklude: temas pri tuta familio de falsaj amikoj, de tuta falsa amikaro! Estus logike, ke esperantistoj, en sia vortuzo, restu ĉe la PIV-a difino! Prefere oni uzu la vorton pudingo do por manĝaĵo, kies ĉefa ingredienco estas faruno, prepariĝas en muldilo aŭ tuko, kaj ne iĝis firma torto. La pladoj, falsaj pudingoj, kies ĉefa ingredienco estas lakto estu nomitaj flaŭnoj. Atentu! Ne kaptiĝu en la reton de alia falsa amiko, nome flano, ĉar tio estas tre vasta nocio laŭ PIV: ĉiu plata, maldika, rondforma bakaĵo el pasto. Kion mi komprenis (kaj nederlande komprenas – eble pli ĝuste "flandre") sub pudingo nepre en Esperanto estas vanila flaŭno. Por la tre nutraj nedolĉaj pladoj

kun ĉefa ingredienco iu viandaĵo, oni povas uzi ekzemple (banboligitan) miksopton ...  
Avantaĝo estas, ke oni esprimos sin pli klare, eĉ se ankoraŭ multaj diversaj manĝaĵoj grupiĝos sub unu sola nomo.

## ***Kion fari?***

Ĉu nun pro tiu malklareco ni devos sidi en sakaĵoj sub cindro kaj pensi, ke nia lingvo malsukcesis pro manko de precizeco? Ne! tute ne! La eblo esprimi sin malprecize, malklare, estas nepra karakterizo de ĉiu nacia lingvo, kaj devas nepre ankaŭ ekzisti en Esperanto! Pensu jam pri la vortoj afero, aĵo, io. Ili estas la plej ekstremaj vortigoj de malprecizeco, sed tamen absolute ne malhaveblaj en iu ajn lingvo. La vorto pudingo do estas, eĉ laŭ sia PIV-a difino, kolektiva vorto (kolektivovorto) kiu indikas multajn diversajn aferojn, kiujn oni povas precizigi per pli malvastsencaj vortoj, aŭ per aldonaj adjektivoj. Cetere nek la mondo nek vi mem pereos pro malĝusta uzo de vorto, plej gravas ĉu bongustis la afero!

## ***Mia kleriĝo***

La antaŭaj pripensoj estas rezultato(j) de problemo, kiun mi starigis al mi (tiel estas ja la homo!) kiam mi volis fari superrigardon de la farunaĵoj. Mi nome hezitis, ĉu nia pudingpulvoro (do finfine la pudingo, almenaŭ la flandra) apartenas al farunaĵoj. Kaj fakte, tiu demando ne jam tute solviĝis, dependas ĉu oni konsideras amelon faruno aŭ ne! Mia ĉiama savanto el krizo (PIV) ne helpas min, ĉar ruze nomas amelon substanco.

Intertempe mi lernis, danke al mia amiko Bertilo, kiun mi sincere dankas pro la valora informo, ke en la Unua Aldono aperis tradukoj en la kvin klasikaj lingvoj, kaj ĉiu el ili estas vere formo de puding. Plia esploro devus esti la konsultado de nacilingvaj klarigaj vortaroj el la komenco de la 20a jarcento. Se leganto havus tian eblon, bv. sciigi al mi la rezultaton!

## ***Flandra ĉerizo sur la pudingtorton***

Nekredeble eble, sed hodiaŭ (6.3.16) mi trovis, finfine post proksimume dek jaroj, respondon al la prema demando: kiel mi traduku la Esperantan "pudingo" en la

nederlandan? Mi rezonadis: se ekzistas aŭ ekzistis vorto por indiki tian "pudingon", ĝi devas troviĝi en "La Preciza Vorto" de Bauwens-Claes (*Het Juiste Woord*), en la rubrikoj pri manĝoj. Do mi konsultis la nociaron, kaj pripensis ĉe ĉiu vorto: ĉu povus esti tio? Kaj jes! Rubriko 531.8 - farunaĵoj (*meelspijzen*) liveras "*ketelkoek*". Kiam mi konsultis *van Dale* por trovi la difinojn de "*ketelkoek*" mi konstatis, ke ties difino respondas ekzakte al la difino de pudingo en PIV! Kaj plie *van Dale* liveris al mi sinonimon: "*trommelkoek*". Jen, vere tre feliĉiga afero, kiu nutros min dum minimume la tutan hodiaŭan tagon!

### **Aldone en Verda Reto:**

Mi jam menciis, supraĵe, sed eble estas bone tute eksplicite diri: en la japana, la responda(j) vorto(j) estas: プリン プデ ゴシツク (prononcu: purin, pudingu); kaj en la ĉina: 布丁 (pinjine, kaj prononce: bùyīng). Do, konstateble estas vorto kiu, pli ol multaj aliaj, meritas la sigelon "internacia", do alprenebla laŭ la 15a regulo; sed tamen eksplicite, jam en 1909, enigita en la Unua Oficiala Aldono de la

Akademio: certe estis frandemuloj en tiu Akademio!

## ***Laborfruktoj***

Do, konklude ... rezultato estas tre modesta en la vortaroj ... sed, kiun laboron tiuj kelkaj modestaj vortetoj kaŝas!!!

En vortaro, E-N: pudingo; ketelkoek; trommelkoek.

En vortaro, N-E: pli komplika, sed mi ne klarigas, ĉar nur interesiĝos nederlandlingvanoj.

## ***Komentoj***

**Paŭl:** Hmmm. Pudo estas rusa mezurunuo. Kio do povus esti pudingo????

**Bernardo:** Por mi ĉiam kaj daŭre unu el la plej ŝatataj el viaj mirindaj leksikologiaj eseoj – kaj se nur estas pro la "boangla" (usona) kaj "eksfiangla" (aŭstralia). Koran dankon, Petro, pro tiu majstro-verko!

Eblus multe diri pri ĝi, ekzemple, ke ĝi bone avertas kontraŭ tiu nuntempe tiom ofta senpripensita kriĉado pri (ŝajna) "kontraŭfundamenteco" – tre tre ofte ja temas pri nur persona trointerpreto de la (malriĉaj) faktoj en la Universala Vortaro (UV) – kaj tiuokaze nura propagando por silentigi homojn, kiuj preferas aliajn interpretojn.

Nune nur jena indiko: Por trovi germanajn signifojn el la epoko de la UV (1887) mi kutime uzas la *Meyers Konversationslexikon*, Leipzig kaj Wien, 4a eld., 1885-1892, kiun oni trovas ĉe retrobiblioteko. Jen ĝia artikolo pri pudingo:

*Pudding (engl.), Mehlspeise aus Mehl, Eiern und Butter. Die englischen Puddinge enthalten in der Regel viel fein gehacktes Rindsfett, werden in einem mit Butter bestrichenen leinenen Tuch in Salzwasser gar gekocht und mit Wein- oder Brandysaucen gegessen. Zu Dunstpuddingen lockert man den Teig durch Eiweißschnee und kocht ihn im Wasserbad in mit Semmel ausgesiebten Formen. Man hat süße Puddinge und solche mit Fleisch, Leber, Fisch, Krebsen, Austern und*

*Gemüse. Genossen werden die Puddinge teils warm, teils kalt, sogar gefroren (Cremepuddinge). Plumpudding ist Rosinenpudding und wird in der Regel mit Rum übergossen, den man beim Servieren entzündet.*

[Traduko de Petro: Farunaĵo el faruno, ovoĵ kaj butero. La anglaj pudingoj normale enhavas multe da fajne hakita bovograso, kaj kuiriĝas (bolante) en lina tuko buterŝmirita en salakvo kaj oni manĝas ilin kun vin- aŭ brandosaŭcoj ... Ekzistas dolĉaj pudingoj kaj pudingoj kun viando, hepato, fiŝo, kankroj, ostroj kaj legomoj. Oni manĝas ilin parte varma, parte malvarma, eĉ frostiĝinta (krempudingo). Prunpudingo estas rozinpudingo kaj normale manĝiĝas kovrita de rumo, kiun oni ĉe prezentado flamigas.]

Laŭ tio do kaj dolĉa kaj nedolĉa farunaĵo. Kaj ĉio estas eĉ pli terura ol vi jam priskribis: Pudingo kun hepato kaj kraboj. Bonan apetiton, glut'!

**Petro Desmet'** respondis al Bernardo: Multan dankon pro via teksto, germana, pri pudingo. Mi estis vere tre feliĉa legi ĝin, kaj

relegos ĝin pli ol unu fojon. En la tre konata franca kuirlibro, kiun mi citis, estas receptoj por cento da diversaj pudingoj, ankaŭ kun krabo kaj hepato!!!!

**Bernardo:** Nahaŭ, Petro, mi ne povis rezisti la tenton traduki vian artikolon en la germanan kaj esperas, ke vi retrovas viajn pensojn. Iom longe mi cerbumis pri la titolo kaj fine decidis por "**Welch ein Brei: Aus tiefem Pudding ruf ich zu Dir ...** " ("Kia kaĉo: El profunda pudingo mi vokas Vin ... "), evidente aludo al la preĝeja kanto "*Aus tiefer Not ruf ich zu Dir, Herr Gott, erhör mein Rufen*". Espereble ĝi ne estas tro blasfema por vi – aliokaze bv. tuj protesti. Sed ĉar vi citis Gen 11,7 mi ankaŭ tiun tenton ne povis rezisti. Cetere mi nomas vin "*flämischer Wörterbuchmacher*". Tio nur formale estas tradukebla per "flandra vortaristo", ĉar en Esperanto ĝi estas tute neŭtrala, sobra esprimo sen kromseno, en la germana kontraŭe ĝi estas nekutima kaj – mi intencas kaj esperas – konotacie pensigas pri "*flämischer Liedermacher*", la kutima kromnomo mialanda de la kanzonisto Jacques Brel. Mi ja volas antaŭanonci kaj krei agrablan etoson de leĝera pri-vortara kantado. Nu, kaj ke "la lando, kie



kreskas la pudingo" kutime estas "la lando, kie  
kreskas la pipro" vi ĉiuokaze tuj komprenis.

## ***9. La Mirinda Mondo de Mimo kaj Momo***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***10. MIOGALO – Mio Kio? – Galo!!!***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

# ***11. Fundamentaj Ŝtonoj de Falpuŝiĝo!***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***12. Arĥaikiĝo neevitebla, kaj ... cetere ... riĉiga***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***13. Roz(et)o en Herbejo?***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***14. Tri Kultureroj***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***15. Tuŝoŝtono: japana tegmentleporo***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.



## ***16. Dio sendu al ni lumon!***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***17. Kamelkaprino kaj Kamloto***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

## ***18. Kamelkaprino***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

# ***19. Odo al Saĝaj Malpruduloj: La Granda Salto Antaŭen***

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.

# ***Kolofono***

**Titolo:** Vortarludoj

**Aŭtoro:** Petro Desmet'

**Kovrilo:** Lode Van de Velde

Flandra Esperanto-Ligo  
Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antwerpen  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)  
© 2020 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi senpaga bitlibro enhavas nur unu  
ĉapitron. La plena verko, kiu estas mendebla de  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be), enhavas 19 ĉapitrojn.